Neniam ŝi ĉesis bedaŭri sian perdon de kunuleco kun sia frato kiu okazis pro lia edziĝo, ĉar li estis al ŝi bona kamarado. Nun ŝi antaŭen rigardis al la tempo kiam denove ili povos havi veran kunulecon. Ŝi sciis, ke li estos tre okupata, kaj, ke li estos for de ŝi plej ofte, sed dum la vesperoj—kaj la tendfajro; ne granda fajro, certe en ĉi tiu dezerto kie la fajra materialo estas malmulta; sed kie estas spiralo da fumo, tie estas konfidencoj kaj longaj ekskursoj en la estantecon, kun ankaŭ vagadoj en estintecon; kaj ŝi estis feliĉa. Baldaŭ ŝi aŭdis la bruon de la reveno de sia frato kiu ekkriis:

“Fine ili estas ĉi tie, nia aro da gvidistoj.”

Bryce turnis sian korpon kontraŭ la tendstango, kun siaj brakoj ankoraŭ trans sia brusto, kaj rigardis tien, kien li montris nordorienten. El la purpura kvazaŭ ombro rajdis tri indianoj, ŝajnis ili venis el sonĝo. La okcidenten iranta suno ŝanĝis iliajn malhelajn vizaĝojn al kupro, kaj donis al ili strangan majestecon kiam ili trotis antaŭen sur siaj vilaj ĉevaloj. Ili estis el la gento Navajo; kaj du el ili estis maljunaj, kies vizaĝojn jam ĉizis la sunoj kaj ventoj de multaj sezonoj, kun la silenta mistero de la dezerto en siaj noktnigraj okuloj.

La tria estis juna. Li rajdis iom antaŭen, kaj havis en sia korpo la greciecon de balanciĝantaj herboj. Li portis malhelan flanelan ĉemizon, nefermitan ĉe la gorĝo, kakian pantalonon, ligitan ĉe la genuo per malstreĉitaj indiĝenaj krurvestoj, kaj cervofelajn ŝuojn. Glata, blanka ĉirkaŭligo ĉirkaŭis lian kapon kaj platigis la dikajn nigrajn harojn tonditajn abrupte ĉirkaŭ la kapo sub la oreloj. Li aspektis same kiel figuro el la libroj de infaneco kaj Fraŭlino Bryce Hayward lin studadis kun mirego. Ŝi povis imagi lin en lia vestaro portantan veluran ĉemizon kaj kolĉenon el peza arĝento.

Sia frato iris antaŭen por renkonti la nekonatojn kie ili ekhaltis je respekta distanco, kaj la juna indiano parolis angle, tre dolĉe sed kun aplombo. Post iom da interparolado la novevenintoj forrajdis mallongan distancon kaj haltis por starigi tendaron.

“Nun, ĉio estas aranĝita,” diris Hayward. “La du maljunuloj estas la plej bonaj gvidistoj en la lando—konas ĉiujn detalojn de ĉi tiu Dioforlasita dezerto, oni diras, kaj la junulo estas bona interpretisto, krom bona ĉasisto. Mi sciigis pri ili de la skabeno en la vilaĝo.”

La meksikana kuiristo anoncis vespermanĝon, kaj baldaŭ la krepusko paliĝis kaj mola nigra mal-lumeco, semita de miliono da steloj, venis mal-

supren sur la dezerton. La varmeco de la tago ankoraŭ donis sin al la tero kaj faris sonĝan atmosferon kiu tiris same kiel manoj je la koro. Bryce sidis ĉe la pordo de sia tendo dum la du viroj interparolis pri diversaj aferoj, kaj tie apud sia malgranda fajro la indianoj sidis kiel statuoj kaj silente fumis.

Tagiĝo trovis la etan aron en movado kaj baldaŭ ili iris antaŭen en la sorĉitan landon.

Je noktigo ili starigis tendaron sur altaĵo kie la ventoj de centjaroj forbalais la antikvan polvon de la roko kaj kie troviĝis nek kreskaĵo nek akvo.

“Hal,” diris la junulino kiam ili sidiĝis, “kion faros la ĉevaloj, akvon ni havas en bareletoj sed ne sufiĉe por ili.”

Kiam ŝi tion diris la juna navajo respondis ĉe ŝia ŝultro dum lia bruna mano etendiĝis por ŝia brido. “Sufiĉan akvon ni havos.”

Ŝi sin turnis rapide kaj rigardis en liajn okulojn. Ŝi sentis strangan magnetan tremon pro la rekta nigra rigardo kiu renkontis ŝian. Estis, ŝajne, neniu pupilo en tiuj dolĉaj malhelaj okuloj, ĉar la iriso estis karbe nigra.

Ŝi cedis la kondukilon kaj iris rigidmiene tien, kie estis la frato, sed ŝi atente observis la indianon kiam li fortrotis kun sia aro da ĉevaloj; ĉiuj sekvis ĝoje post siaj tagoj da servado suna kaj sabla, kvazaŭ ili ankaŭ sentis kie estas ĉi tiu mistera akvo. Post unu horo la ĉevaloj revenis tra la bela krepusko, kun siaj paciencaj vizaĝoj portantaj esprimon de kontentiĝo. Post la vespermanĝo Bryce iris rekte al la loko kie ripozis la indianoj ĉe la fajro, kaj diris al la interpretisto:

“Kie vi trovis la akvon, kaj kiel vi sciis, ke ĝi estas tie?”

Li ekrigardis supren al ŝi, leviĝis kaj staris dum li parolis. “Kiel?” li diris dolĉe. “Vi scias kion la presita linio diras, per la literaj signoj. Mi scias per la teraj signoj—la ĉevaloj scias per la ventaj signoj.”

“Bonege,” diris Bryce ridante.

La sekvintan tagon la vojo kondukis en misteran regionon. La dezerto kuŝis malantaŭe. La ebenaĵo cedis al krutaj supren kondukantaj oblikvoj, kiuj falis kaj ree iris oblikve supren, elvenantaj en landon de grandaj sabloŝtonaj krutajoj formorditaj de la elementoj en malglatajn akrajn pintojn kaj fendetojn ĉe kies piedoj kuŝis grandegaj amasoj da rompiĝinta kaj falinta roko. Beletaj valoj aperis, kaj juniperoj kaj cembraĵoj pinoj kreskis abunde. Malproksime ĉe la rando de la mondo vastaj montoj kvazaŭ trudis siajn ŝultrojn en ĉielon, kaj ŝajnis mirindaĵo.

Dum tri tagoj ili penetris ĉi tiun feinejon de konfuzeco, kaj ĉiam la sorĉado pligrandiĝis. Ĉiam profunde en la virina koro kuŝis timo pri manko de akvo—kaj ĉiam la navajo ĝin trovis.



Hayward kaj lia kunulo Carrigan estis tre okupataj, kaj ofte Bryce restis sola dum la viroj faris ekskursojn en la ĉirkaŭajn montojn. Tamen, Fraŭlino Bryce estis bona kunulino kaj neniam estis trokritikema. Estis nur unu afero kiun ŝi nomis al sia frato Hal; ke ŝi malaprobis la meksikanan kuiriston, kaj petis, ke li lasu unu el la Navajoj por esti ĉiam kun ŝi. Poste la juna indiano restis, laŭ la deziro de Bryce. Kiam ajn ŝi estis sola, aŭ sur vojo, aŭ ĉe tendejo, Hayward ordonis, ke la interpretisto estu apud ŝi. Ĉi tion li faris ĉar la du pli maljunaj indianoj estis la oficialaj gvidistoj kaj tial devis akompani lin. Do, kiam ajn la junulino estis ĉe la pordo de sia tendo, en ia pentrita valetto, aŭ sur ĉevalo ĉe la rando de alta krutegaĵo de kie la mondo kvazaŭ defalas, kaj la vinaj aeraj fluigis la sangon en ŝiajn palajn vangojn ŝi parolis kun la indiano.

Foje ŝi demandis, "Kia estas via nomo?" Kaj li respondis:

"Vi ne povos elparoli ĝin, sed mia gento nomis min Nigra Aglo."

"Kaj la aliaj? Kiuj ili estas?"

"La indiano kun la cikatroplena vango, lin ni nomas la Batalanto, la alian Ĉuska la Blanka Abio, ĉar, kiam li estis junulo, li estis belega."

"Kaj vi, kiel vi povas paroli tiel bonan anglan kaj ili ne ŝajnas scii eĉ unu anglan vorton."

"Ili estas maljunaj," diris Nigra Aglo kviete.

"Mi komprenas," respondis la virino kaj komencis pensi pri la stato kaj la kortuŝado de la malaperanta raso.

"Ĉuska estas *shaman*," diris Nigra Aglo; "li veturis multe, ĉar li kantis ĉe la beno de multe da *boganoj*. Li multe scias."

Bryce fikse rigardis la junulon, kaj sondis iom pli profunden, sed li nenion diris. Fakte, li fermis siajn lipojn kaj sidis silente tiel longe, ke ŝi imagis, ke li ĉagrenis ĉar li parolis pri tiaj sanktaj aferoj.

En eta valo, perdita inter la eternaj sabloŝtonaj muroj, plena de verdeco kaj akvumita de kristalaj fontoj, la grupo starigis tendaron.

"Fratino mia," diris Hayward. "Ĉu vi timos gardi la tendaron dum kelkaj tagoj? Ni volas iri inter la montetojn. Ni lasos al vi Nigran Aglon, kaj ankaŭ mian pafilon, kaj en la pakajoj troviĝas kelkaj freŝdataj libroj."

"Certe ne," respondis la junulino. "Mi tre ŝatos tion! Vere pionira situacio."

Do, Hayward kaj Carrington kun la gvidistoj kaj kelkaj ĉevaloj ekiris en la solecan sovaĝejon, kaj la sola mondo kiun ŝi iam konis falis de la Fraŭlino, lasante ŝin en la koro de la primitivo.

Ŝi atente observis la sunon, kiam ĝi venis super la ruĝan randon de la remparoj oriente, kaj sendis sian fluan da orkolora lumo glitanta grade mal-supren laŭ la kontraŭa vizaĝo de la roko, kaj sentis, ke ŝi nenian vidis ion tiel subtile ravantan.

La meksikana kuiristo atentis pri siaj devoj, kaj iom malproksime Nigra Aglo piedligis la ĉevalojn kaj ilin paŝtis. Ŝi indiferece rimarkis la graciecon de lia malgrasa korpo kaj ĝian sugestion de forteco. Baldaŭ li venis kaj staris antaŭ ŝi.

"Kion vi faros hodiaŭ?" li demandis. "Kion vi volas, ke mi faru?"

"Mi iros por esplori," ŝi diris decide. "Mi opinias, ke nepre estas multe da belaj lokoj en ĉi tiu paradizo." Sin turnante ŝi eniris sian tendon kaj prenis siajn kameron kaj pafilon. Ŝi portis kakian vestaĵon kun mallonga jupo kaj fortajn laĉbotojn ĝis la genuoj. Kutime ŝi kovris sian kapon per meksika ĉapelo sed ĉi tiun tagon ŝi ne volis tion fari.

"La suno estas tro glora," ŝi pensis. Sed la indiano, ĉiam observema, reprenis ĝin.

"Bonege nun," li diris, "poste ne tiel bona. La varmeco pli intensiĝas en ĉi tiuj valoj je proksimume tagmezo."

La junulino sin turnis rapide kaj lin rigardis. "Nigra Aglo," ŝi diris kiam ili formarŝis. "Kie vi lernis anglan?"

Por la unua fojo ŝi vidis rideton ludi trans lian vizaĝon, kiu tiris liajn lipojn for de pure blankaj dentoj.

"Mi ne volas paroli la anglan," li diris laŭ la maniero de la indianoj, per raŭka voĉo tute malsama al sia kutima dolĉa voĉo, kaj ŝi ne povis inklinigi lin paroli plu.

La valo estis longa kelkajn mejlojn, kiu grade mallarĝiĝis ĝis pinto; ili iris okcidenten ĝis la muro kaj ĝin sekvis. Rekta kiel sondilo la vasta vizaĝo leviĝis al alia kvazaŭ mondo kiun divenigis la abiaj arboj kreskantaj ĉe la rando. La elementoj estis skulptintaj ĝin en milojn da forfrotajoj, grandegaj turpintoj, kaj la plej supraj pintoj staris pretaj por disiĝo kaj falo je la malplej forta tuŝo.

Konsternite, la blanka virino fikse supren rigardis al ĝi. La indiano staris silente kaj ŝin observis.

"Mirinda," ŝi flustris, tiam laŭte: "Kiom malmulte ni scias pri la majesteco de la naturo. Ni kiuj loĝas en urboj."

"Mirinda," respondis navajo, "Koloro de la okcidento, brila oro."

"Kion?" ŝi demandis, sed li nur skuis la kapon.

Ili iris malrekte inter la kadukaj rokoj al la fundamento de la deklivo, kaj tiam inter la arboj al loko kie la sunlumo nur malmulte penetris, kaj tiam la junulino ekhaltis por ekkrii je la beleco de la lumo, kaj baldaŭ ili atingis la pinton kie la valo mallarĝiĝis kaj la minacaj muroj kuniĝis ĉe akra abruptaĵo. Lo sono de akvo salutis iliajn orelojn kvazaŭ por bonvenigi la vizitantojn, kaj Bryce iris arde antaŭen.

Eta rivereto elvenis el fendo en la muro por fali muzike en etan pelvon tute rondan, tranĉitan el



la solida kaj brilanta roko mem. Du altaj poploj staris apud la lageto kaj Nigra Aglo, demetinte la kameron, (li lasis al ŝi la pafilon) kolektis plenan da folioj, lerte interligis ilin per eta dornaro, kaj prezentis al ŝi tason da akvo kies dolĉecon oni ne povus superi. Kiam li genufleksis ĉe la rando de la pelvo kaj supren tenis la tason, la junulino eksaltis, kaptis la kameron kaj klakis ĝin.

"Mi faris bildon de vi, Nigra Aglo," ŝi diris ridante. "Gloro! Bonega bildo ĝi estos!" Momente ŝi staris rigardante malsupren, tiam ŝi levis siajn okulojn kaj studadis lian malhelan vizaĝon kun liaj nigraj, supren rigardantaj okuloj sub la blanka volvaĵo, la abundecon de nigraj haroj, la ĉizitan gorĝon levantan el la malfermita kolo de la blua ĉemizo, la malgrasan viglan korpon kiu portis tiel subtile la similecon al pantro pro sia fleksebleco kaj fortoco.

Je tiu momento ŝi estis tute senkonscia pri lia humaneco. Ŝi vidis nur lian romanecon, lian pentrindecon. Li apartenis al la sabloŝtonaj muroj, la suno kaj la silenteco, la kaŝitaj valoj kaj la dezerto. Ŝia rigardo, apartigita kaj senpersona, renkontis liajn okulojn kaj restis fiksita je ili. Momente ŝi tiel staris. Tiam subite malvarmiĝo kuris tra ŝia tuta korpo de kapo ĝis piedoj. Ŝi subite revenis el abstrakteco, ĉar ŝi ekvidis, ke liaj okuloj fluidiĝis kaj fariĝis mildaj kaj belaj. Sub ŝia ŝangita esprimo liaj okuloj malleviĝis al la akvo kaj li demetis la tason el kiu ŝi trinkis, dum li kurbiĝis rapide, metis sian vizaĝon ĉe la supraĵo de la lageto laŭ la antikva maniero de siaj prapatroj.

"Ĉi tiu estas la 'Loko de Arĝenta Akvo,' li diris, leviĝante, nia gento ĝin konis dum multaj jaroj sed nemultaj el ili venas ĉi tien."

"Kial?"

"Ĉar foje ĝi apartenis al la 'Tondra Dio' kaj li estas ĵaluza pri ĝi."

Bryce fermis la lipojn kaj lin rigardis. "Ĉu vi kredas tion?" ŝi demandis.

"Mi estas Navajo," li respondis.

Malfrue en la posttagmezo ili alvenis al la tendaro. Bryce, lacega pro marŝado, kuŝis longatempe en sia tendo, pensante pri la beleco de la kaŝita valo kaj la 'Loko de Arĝenta Akvo.' Kun la vizio de la fonto ree venis memoro pri la okuloj de la indiano kaj ŝi sulkiĝis la brovojn.

Kiam la suno iris malantaŭ la grandan muron, plenigante la pelvon de la valo per malvokoloro kaj lumo, ŝi elvenis por ree trinki la bonodoran teon kaj manĝi la spicajn manĝaĵojn kiujn Manuelo servis sur la eta tablo. Poste ŝi sternis lankovrilon apud la spirala fajro kaj sidis kun genuoj en brakoj, absorbante la mirindaĵon de la dezerta vespero.

Nigra Aglo prizorgis la ĉevalojn kaj baldaŭ venis gracie al ŝi kun la brakoj falditaj kaj ŝin rigardis trans la eta flamo.

"Sidiĝu," ŝi ordonis, "kaj diru al mi pri ĉi tiu lando kaj ĝiaj homoj." Obeeme li sidiĝis, liaj piedoj sub sia korpo.

"Estas nur malmultaj el nia gento en ĝi nun, ĉiun jaron ili malpligrandiĝas. La *boganoj* estas disĵetitaj malproksimen en la dezerto. La paŝtejoj estas iom bonaj sed la cervoj kaj antilopoj malpligrandiĝas, same kiel miaj homoj."

"Hoganoj?" demandis la junulino.

"Domoj—domoj de la Navajoj."

"Kie ili estas? Kial mi ne ilin vidis?"

Nigro Aglo ridetis. "Kvin fojojn vi transiris la dezerton, kaj vi pasis tiel proksime de unu kiel la flugo de sago."

"Kie?"

"Kaŝita en la fendajoj. Miaj homoj estas timemaj kaj konstruas malproksime por si mem. Ili kaŝas same kiel birdoj."

"Ĝi estas bela lando, Nigra Aglo," ŝi diris reveme, "kaj tuŝas la koron."

"Ĉu vi amas ĝin?" demandis la Navajo.

"Tre multe," ŝi respondis arde.

Longatempe ili sidis silentaj dum la purpura lumo fluis en mildan grizan krepuskon kiu silentigis la voĉon kaj inspiris primitivajn sonĝojn.

"Klarigu al mi pri la *boganoj*, kion ili similas?" demandis Fraŭlino Bryce Hayward.

"Nenion—al vi," respondis la indiano.

"He?"

"Vi loĝas en urboj superplenigitaj de homoj. Oni povas meti multe da niaj *boganoj* en unu ĉambron de viaj domoj. Viaj plankoj estas molaj. La niaj estas malmolaj. Vi havas pordojn, kaj ili moviĝas sen bruo, ili havas serurojn, ni havas nur lankovrilon kiu pendas je la orienta flanko." Li skuis la kapon kaj restis silenta, kaj denove ŝi sentis la timeton kiu gardis iliajn sekretojn de la nekonato, tamen, li ŝin rigardis trans la eta fajro kun sopirema dolĉeco.

"Diru al mi," ŝi ree ordonis. Kaj denove, same kiel hundo obeas la mastron, Nigra Aglo parolis.

"De niaj *boganoj* oni devas havi klaran vidon al la oriento, kie loĝas la Dio de sunleviĝo. Kvin pezaj kaj dikaj lignoj devas esti por la domo mem, fortaj, bonaj lignoj sen ŝelo, du perfekte rektaj por la pordoj, la aliaj forkhavaj. Super ĉi tiujn ni metas la tegajon, ŝelon kaj alian ŝtofon, kaj fine amason da tero; estas ankaŭ fumtruo. Elfinita, ĝi estas 'hogano nijoni' aŭ bela domo."

"Ĉu tio estas ĉio?" demandis la junulino.

"Parolu plu."

"Ni havas 'house warming,' (endomiĝa festo. Angla vorto kiu signifas konsekradon de la domo faritan de amikoj kiuj vizitas la posedanton, kaj kiuj trinkas kaj manĝas, tiel la domo fariĝas hejmo). 'Ni ankaŭ—' sed ŝi lin haltigis.

"Diru al mi," ŝi diris, "kie vi trovis tiun vorton?" Tamen, li daŭrigis, kvazaŭ ŝi ne parolis.



"Ni havas ĝin, ankaŭ, kiam estas finita la *bogano* ĉiuj niaj amikoj venas por helpi, kaj poste la Navajoj benas ĝin per grio jene:

"Al la starantaj lignoj la grio estas donata,  
blanka grio kiu estas la plej bona.

Al la suda pordeja ligno, suda, okcidenta,  
orienta.

Al la tuta domo estas donata ĉi tiu beno de  
pleneco.

Kaj jen estas la vortoj de la beno:

"Mi volas, ke ĝi estu ravanta, mia domo;  
De mia kapo mi volas, ke ĝi estu ravanta;  
Al miaj piedoj mi volas, ke ĝi estu ravanta;  
Kie ni kuŝas mi volas, ke ĝi estu ravanta;  
Ĉio super mi estu ravanta;  
Ĉio ĉirkaŭ mi estu ravanta."

Al fajro estas donata jene: "Estu ravanta kaj  
sana, mia fajro."

"Kaj al la fumturo jene:

"Estu ravanta, Suno, la prauulo de mia patrino,  
por ĉi tiu donaco." "Kaj al la pordejo, kie ĉiuj  
benoj venas kaj foriras jene:"

"Estu ravanta, ĉi tiu vojo de lumo."

Li parolis per sonora voĉo kiu, tamen, estis tiel  
milda kiel la krepusko ĉirkaŭ ili kaj ne eĉ atingis  
la poplojn kie la meksikano fumis en la mallumo.  
Bryce tenis la spiron en sia gorĝo, atendente, sed

li ne parolis plu. Longe li restis silenta kaj fine  
leviĝis kaj staris super la mortanta fajro.

"Estas malfrue," li diris, "se ni marŝos morgaŭ  
vi devas dormi." Li forpaŝis en la ombrojn, kaj  
la junulino sidis sub la sorĉo de ĉi tiu ekvido en  
la kaŝitajn aferojn de la dezertaj homoj. Ŝi sentis  
honton kvazaŭ ŝi levis, neinvitate, la kurtenon  
antaŭ sanktejo. Ĉu ŝi ne devigis lin paroli kaj,  
tamen, li povis rifuzi, sed ŝi rememoris, ke li ĉiam  
ŝin obeis, eĉ ŝian plej trivialan vorton aŭ volon,  
kun embarasata graveco. Li estis stranga estaĵo,  
ĉi tiu altkreska, bruna fortmuskola junulo kun  
sia abunda kaj belega sano. Kiam ŝi leviĝis por  
iri en sian tendon li venis al ŝi kviete el la ombroj  
kaj donis al ŝi etan sitelon da akvo, dolĉa kaj pura,  
el unu el la fontoj—kaj ŝian pafilon.

"Dankon," ŝi diris, "sed kial vi donas al mi la  
pafilon?"

"Eble vi sentos vin pli sendanĝera," diris Nigra  
Aglo, rigardante al ŝi el la mallumo.

Stranga, ja, ĉi tiu sovaĝulo kiu prezentis al ŝi  
pafilon por ke ŝi povu senti sin—pli sendanĝera.

Ŝi rigardis sian reflektajn en sia eta spegulo  
nevidante;—studante la problemon:—Kio estis,  
kio estas Nigra Aglo? De kie li akiris sian bonan  
anglan, sian kvietajn opiniojn pri la blankulo, sian  
sciadon pri la homplenegaj urboj kaj lando? Ĉion  
tion ĉi ŝi ne povis kompreni.

DAURIGOTA.

## New Books : Novaj Libroj

*Esperanto Literature; Notes and Impressions.*  
K. R. C. Sturmer, Esperanto Publishing Company,  
142 High Holborn, London. Price 6d, or post-  
free, 7d.

A part of the preface of this little book of 46  
pages may serve as a review. "The need for a  
brief sketch in English of the literature of Esper-  
anto has been felt for some time past." "This  
little book is an attempt partially to meet the need,  
and though the rapidity with which the literature  
is growing will soon make it inadequate, it may  
serve its purpose for a short while."

Fourteen pages are devoted to a birds-eye view  
of original Esperanto literature and the reader is  
"intrigued" by the array of alluring prose and  
poetry presented. The remainder of the book con-  
sists of collections of reviews of eight or ten of the  
more recent publications and descriptive lists of  
some of the best translations from the literatures  
of many of the national languages.

CHARLES H. BRIGGS.

*Por Recenzo!* K. R. C. Sturmer. The Esper-  
anto Publishing Co., Ltd., 142 High Holborn,  
London. Papero, 1 ŝ. 6 p.; bindita, 2ŝ. 6 p.;

afranko 2 p.

Tiu ĉi 61-paĝa libreto de skizoj temas la tra-  
vivaĵojn kaj pensojn de kelkaj kvar Londonanoj.  
Ĝi priskribas ne tute simpatie la kontrastojn de  
kelkaj el la klasoj aŭ kast-tavoloj de la brita socio.  
La personoj ŝajnas ne esti tute konsekvencaj kaj  
ne ĉiuj motivoj estas klaraj, almenaŭ al la menso  
de unu Usonano. La impresoj donita estas fine ke  
la libro ne estas kompleta.

La verkisto uzas iom tro multajn neologismojn,  
el kiuj li klarigas sep: aprezi-ŝate kompreni, etoso-  
animo de loko, svelta-gracie maldika, evento-  
definitiva okazaĵo, obscena-ofenda al la seksa  
ideologio, oĉjovorto amema aŭ kaj malestima, uzata  
pri ne ĉeestanta viro, morna-malgajiga. La sig-  
nifojn de kelkaj oni devas konjekti, ĉar ili ne estas  
en la nova Plena Vortaro: p. 13 Fugo (fuĝo?),  
p. 14 stumbli, p. 21 stoko, p. 31 kvika, p. 32  
taksio, p. 43 kretinularo (kretenaro?), p. 54 vor-  
tumi, p. 12 dribli, p. 58 hafo.

La libro ne estas facile legebla. La sekvantaj  
frazoj estas ekzemploj: p. 10 Davis scivolis, ĉu jen  
piketo, kredis ke ne. P. 22 premis sin tra la  
seĝoj kaj vizaĝoj. P. 22 grandaj gutetoj. P. 30  
motorbiciklo kiun li \* \* \* volis umi el la patra



monujo. P. 30 "Mi havas," diris la filo, vidante, ke la patro metas la manon al la ŝlosilpoŝo.

CHARLES H. BRIGGS.

*Esperanto kaj Kulturo* de Bro. Robert Trogel. Tradukis J. Schroeder. (Heroldo de Esperanto, Koln.) 37 p. R. M. .80.

Speciala Represo el Vol. 8, Kongreslibro de la 17a Germana Esperanto-Kongreso, 1928.

La verkisto rimarkas ke multaj el la pli fruaj kontraŭaĵoj kontraŭ Esperanto refutiĝis. Nun oni neniam prezentas ilin. Li citas kelkajn last-tempajn kontraŭaĵojn, plejparte el Germanaj fontoj, kaj per severa kaj neforkurebla logiko li detruas ilin. Ĝar ĝi sendube estas laŭlitera traduko de la germana lingvo, ĝi transportas multajn karakterizojn de tiu lingvo (kunmetitajn vortojn kaj vortordo). Tio faras ĝin iom malfacile legebla. Tamen ĝi estas tre valora armilo kontraŭ iuj el la ŝajne fortaj argumentoj foje prezentitaj kontraŭ.

CHARLES H. BRIGGS.

*Al Torento*, Originala Novelo de Stellan Engholm. Heroldo de Esperanto, Koln. 94 p. R.M. 1.50.

Junulo el la arbaroj de Svedujo trovas en proksima urbo knabinkunulinon. Kamarade kaj fratine ŝi reciprokas liajn sentojn kaj amon sed ial repelas lin strange ĝis fine ŝi gravediĝis de alia viro kiu forlasis la landon. La emociojn de la geamikoj, kiuj devas ne plu vidi sin, la verkisto delikate pentras. Post monatoj li vizitas kaj fine akceptas ŝin kaj la knabeton. Troviĝas rimarkoj pri sociaj demandoj kaj tio kio feliĉigas la vivon sed la libro ne estas propagando por ia sistemo de socia reformo. Krom kelkaj iom nubaj frazoj, ĝi estas simpla, bele verkita noveleto.

CHARLES H. BRIGGS.

*Internacia Legolibro*, Diverslandaj Aŭtoroj, Redaktanto: A. Kenngott Formato 4½ x 6¾, 123 pagoj. Enhaves 16 originalajn rakontojn. Internacia Eldonejo, Austin, Texas.

Jen estas nova libro de nia amerika aŭtoro kaj kunlaboranto. La libro estas bele presita kaj bindita kaj ĝi estas speciale rekomendinda por la uzado de klasoj aŭ individue studentaj Esperantistoj. Kiel en siaj verkoj Kenngott donas materialon el la ĉiutaga vivo, kiu ebligas la leganton lerni esprimojn kiujn li uzas en sia interparolado kaj korespondado. Ni preferas tion anstataŭ legi priskribon pri reĝoj, princoj aŭ feinoj. La libro estas bona aldono al la multaj aliaj verkoj de la sama aŭtoro.

J. J. SUSSMUTH.

Ĉiuj recensitaj verkoj estas haveblaj ĉe la Centra Oficejo de E. A. N. A.

## Books We Recommend

### INFORMATION

North American Esperanto Almanac, 1930 .....	.50
Radio Wireless and World Language, J. J. Sussmuth .....	.10
Esperanto, The Second Language, Wendell .....	.15

### INSTRUCTION

Esperanto for Beginners, Lowell .....	.10
Kenngott's Esperanto Course .....	1.00
Practical Grammar of Esperanto, Kellermann-Reed .....	.75
Guide to Esperanto, Hamann .....	.25
Spoken Esperanto, Frost .....	.60
Esperantistigilo, Benson .....	2.50
Internacia Legolibro, Kenngott .....	.50

### DICTIONARIES

Esperanto Key .....	.05
Edinburgh Pocket Dictionary .....	.75
English-Esperanto, Fulcher-Long .....	2.00
English-Esperanto, Harris .....	.20
Plena Vortaro de Esperanto .....	3.00

### LITERATURE

Akrobato de Nia Sinjorino, Payson .....	.25
Aelita, A. Tolstoi, paper .....	1.10
Blankĉevala Rajdanto, Storm .....	.80
Bela Joe, Saunders, cloth .....	2.00
Blanche, Payson .....	.35
En Okcidento Nenio Nova, Remarque, paper .....	1.50
cloth .....	2.10
Ilustritaj Rakontoj, Kenngott .....	.25
Juneco kaj Amo, Payson .....	.60
Karto Mistera, Payson .....	.35
La Sankta Biblio .....	1.65
Landoj de la Fantazioj, Jung, paper .....	1.00
half cloth .....	1.50
La Dormanto Vekiĝas, Wells, paper .....	1.20
cloth .....	1.70
Luno de Israel, (Haggard), Payson .....	1.50
Mallonga Biografio de H. Fawcett, (Holt), Weems .....	.25
Mimi, (Giesy), Payson .....	.35
Miserere kaj Thais, (Wagnalls), Payson .....	.50
Mopso de Lia Onklo, Chase .....	.15
Rozujo Ĉiumiljara, (Wagnalls), Payson .....	.50
Sep Ridoj, Wendell .....	.25
Sub La Meznokta Suno, Wendell .....	.35
Taso de Am servo, (Taylor), Weems .....	.35
Surprises on Sylvan Farm, Fisher .....	.15



## Club Directory—Cont'd

*Detroit, Mich.* Esperanto Office of Detroit, 2916 E. Grand Blvd., Detroit, Mich. Pres., Dr. Tobias Sigel; Sec'y and Treas., Miss Elizabeth A. Stauffer. Meets irregularly.

*Detroit, Mich.* Pola Esperanto Associo. Mr. B. Lendo, Sec'y, 3596 29th St.

*Duluth, Minn.* Duluth Esperanto Club. Pres., Mr. E. Bauer, Arlington Heights, Duluth; Sec'y, Mr. H. Merry.

*Jersey City, N. J.* Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Ave. Sec., Mrs. H. Tylick. Meets every second Saturday of the month. Publishes quarterly "Esperanto Land'o."

*Lithopolis, O.* The Wagnalls Memorial Esperanto Society. Children's classes each Saturday afternoon. Adult classes each Tuesday evening.

*Madison, Wisc.* Amerika Esperanto Instituto, Hotel Sherlock, Madison, Wisc. Sec'y, Karl Froding. Meets every Sunday at 11 a. m.

*New York City, N. Y.* Esperanto Klubo "Harmonio." Meets every third Saturday of the month (from October to May) at 7 p. m., at Hotel Cumberland, Broadway and 54th St., New York City. Pres., Mrs. Mary H. Ford; Sec'y, Mrs. E. A. Meerbott, 109-32 143rd St., Jamaica, N. Y.; Vice-Pres. and Organizer, Berthold Schmidt.

*New York City, N. Y.* Bahai Centre. Meets every second and fourth Saturday evenings at 119 W. 57th St.

*New York City, N. Y.* SAT Rondo Nov-Jorka. Meets every Friday at 108 E. 14th St. Sec'y, Irene O. Feingold, 708 W. 192nd St., New York City.

*Philadelphia, Pa.* Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

*San Francisco, Calif.* The Esperanto Ass'n of California, 309-11 DeYoung Bldg., San Francisco, Calif. Sec'y, R. Hill. No regular meetings.

*St. Petersburg, Fla.* Sunbrila Rondo, 127 1st Ave., St. Petersburg, Fla. Pres., Roy S. Hanna; Sec'y and Treas., Esther Owen-Flint. Meets at Princess Martha Hotel, Wednesdays, at 3 p. m.

*Topeka, Kans.* Topeka Esperanto Association, 1122 W. 8th St., Topeka, Kans. Pres., Captain Geo. P. Morehouse; Sec'y and Treas., Mrs. Lida R. Hardy. Meets first Thursday of the month at 1122 W. 8th St. Two advanced and Beginners' classes.

*Toronto, Canada.* Toronto Esperanto Klubo, Peacock Inn, 99 Yonge St., Toronto. Pres., Elvin J. Bengough; Sec'y and Treas., Harry Wall. Meets 6:30 p. m. at Peacock Inn.

*Worcester, Mass.* Worcester County Esperanto Society. Meets at call of Council, at R. 17 P. O. Dr. Gustave Desy, Pres., Box 450, Millbury, Mass.; Odiorne Gleason, Sec'y and Treas., R. 17 P. O.

Strictly laŭfundamenta and a direct answer to

### HOW TO MAKE PERMANENT ESPERANTISTS?

### Begin with Frost's SPOKEN ESPERANTO

for teachers and self study plus 5 Sp'esp'o bildaroj for pupils together \$1.00—or 10 Sp'(oken) Esp'(eranto) bildaroj \$1.00; or 50 All-World Base Maps \$1.00, to locate commerce, history, travel.

N. W. FROST, Brownfield, Maine; or  
ESPERANTO ASSOC. OF NORTH AMERICA  
FORT LEE, NEW JERSEY



## SHOW CARD LETTERING Learn at Home

HERE is the very course you need if you want to get a good paying position as a Show Card Letterer or Sign Letterer, or have a business of your own. This course is complete and practical and especially arranged to meet the needs of the student who studies at home. It was written by F. L. Koller, Principal of the School of Art of the International Correspondence Schools, member of the American Federation of Arts, and The National Society of Craftsmen.

Mr. Koller has had twenty years' teaching experience, and his success in helping other men and women is an indication of what he can do for you.

H. L. Wood, a clerk, made more than \$700 "on the side" before he had completed his course and also won \$125 in prizes. Harry William Lord writes that he has more than doubled his salary as a result of studying this I. C. S. course in spare time. William Whitman, a former wagon builder, now has a sign painting business of his own and is earning nearly three times as much as he did before enrolling with the International Correspondence Schools.

There is no doubt that Show Card Lettering and Sign Lettering offer a real opportunity to ambitious men and women. Just mark and mail the coupon and we'll gladly send you a booklet telling all about the I. C. S. course in Show Card Lettering, or any other subject in which you are interested.

### INTERNATIONAL CORRESPONDENCE SCHOOLS

"The Universal University"  
Box 1269, Scranton, Penna.

Without cost or obligation on my part, please tell me how I can qualify for the position or in the subject before which I have marked an X:

#### SHOW CARD LETTERING

#### ILLUSTRATING

#### CARTOONING

- |   |   |
|---|---|
| <input type="checkbox"/> Business Management            | <input type="checkbox"/> Advertising            |
| <input type="checkbox"/> Business Law                   | <input type="checkbox"/> Better Letters         |
| <input type="checkbox"/> Banking and Banking Law        | <input type="checkbox"/> Stenography and Typing |
| <input type="checkbox"/> Accountancy (including C.P.A.) | <input type="checkbox"/> English                |
| <input type="checkbox"/> Nicholson Cost Accounting      | <input type="checkbox"/> Civil Service          |
| <input type="checkbox"/> Bookkeeping                    | <input type="checkbox"/> Railway Mail Clerk     |
| <input type="checkbox"/> Private Secretary              | <input type="checkbox"/> Common School Subjects |
| <input type="checkbox"/> Salesmanship                   | <input type="checkbox"/> High School Subjects   |

#### TECHNICAL AND INDUSTRIAL COURSES

- |   |  |
|---|--|
| <input type="checkbox"/> Electrical Engineering                           | <input type="checkbox"/> Surveying and Mapping                       |
| <input type="checkbox"/> Electric Lighting                                | <input type="checkbox"/> Architect                                   |
| <input type="checkbox"/> Mechanical Engineer                              | <input type="checkbox"/> Architect's Blueprints                      |
| <input type="checkbox"/> Mechanical Draftsman                             | <input type="checkbox"/> Contractor and Builder                      |
| <input type="checkbox"/> Machine Shop Practice                            | <input type="checkbox"/> Architectural Draftsman                     |
| <input type="checkbox"/> Railroad Positions                               | <input type="checkbox"/> Structural Engineer                         |
| <input type="checkbox"/> Gas Engine Operating                             | <input type="checkbox"/> Chemistry <input type="checkbox"/> Pharmacy |
| <input type="checkbox"/> Civil Engineer                                   | <input type="checkbox"/> Automobiles                                 |
| <input type="checkbox"/> Steam Engineering <input type="checkbox"/> Radio | <input type="checkbox"/> Mathematics                                 |

Name .....

Street  
Address .....

City ..... State .....



# ISOLATED STUDENTS

---

If you have no opportunity to join a class and you wish to learn Esperanto thoroughly, not only to get a diploma of learning "Atesto pri Lernado," but also a diploma of capability "Atesto pri Kapableco," apply for and study E. A. N. A.'s official

## PRACTICAL CORRESPONDENCE COURSE IN ESPERANTO

in three terms of fifteen lessons each,

BY HERBERT M. SCOTT

Member of Lingva Komitato and former editor of *Amerika Esperantisto*.

---

The complete course will also earn you the "Atesto pri Instruado," a diploma which gives you the knowledge and privilege to become a Teacher of Esperanto.

---

E. A. N. A. Needs Teachers,—now more than ever. Our Five Year Program requires teachers in every State of the Union and every Province of Canada. Teachers will earn money and your tuition fee will be repaid many times, both in pleasure as well as in cash.

---

All instruction is individual and diplomas are guaranteed.

---

Payment is required in advance as follows:

\$15.00 for each term, or

\$40.00 for the complete course.

---

Write for application blank to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

FORT LEE, NEW JERSEY